

El: *Heroldo de Esperanto* 63. 1987: 3 (1774), p. 1, 3; 415 (1775/76), p. 7.

ESPERANTO KAJ PAPIAMENTO la plej simplaj gramatikoj

... that language ranks highest which goes farthest in the art of accomplishing much with little means or, in other words, which is able to express the greatest amount of meaning with the simplest mechanism.

Otto Jespersen, *Language*, p. 324

Motivigo

Jam de jaroj mi interesiĝas pri la kreola lingvo Papiamento, kiun oni parolas en Nederlandaj Antiloj, t.e. sur la insuloj Kuracao, Arubo kaj Bonajro (Papiamente: Corsou, Arubai i Boneiru), apud Venezuelo. Kiel sciante, kreola lingvo (*Kreolische Sprache*, *Creolized language*, *Parler créole*) estiĝas, kiam malsamaj lingvoj venas en kontakton, interkompreno fariĝas malfacila, kaj el la baraktado por reciproke interrilati emerĝas porokaza lingvo, kiu iom post iom fiksiĝas. Kiam la leksiko venas el pluraj lingvoj, ĝenerale oni akceptas la sistemon de unu el la lingvoj en kontakto, sed laŭ tre simpligita formo.

Se, kiel diris Jespersen per la kape citita moto, “plej alte staras tiu lingvo, kiu la plej bone ellaboris la arton multon plenumi per malmultaj rimedoj aŭ, alivorte, kiu kapablas esprimi plej multe da signifo per la plej simpla meĥanismo”, certe Papiamento kaj Esperanto klasiĝas inter la plej perfektaj lingvoj de la mondo.

Por montri al lingvistoj kaj esperantistoj, kiel tiu lingvo povas klare esprimi plej altajn ideojn kaj pensunuancojn sen neceso je kiu ajn morfologia ŝanĝo ĉe la bazaj radikoj, same kiel okazas en la internacia lingvo Esperanto – en tiu ĉi pli regule sed ankaŭ pli formabunde –, venis al mi la ideo fari rudimentan priskribon de Papiamento, tiel, ke Esperanto-lingvistoj povos libere kompari ambaŭ lingvojn. Kaj samtempe plian fojon montri la intuician geniecon de Zamenhof, kiam li sistemigis Esperanton sen scio pri la ekzisto de Papiamento, kies unuaj presaĵoj

aperis meze de la 19a jarcento, sed kies scienca prezento fare de kompetenta lingvisto okazis por la unua fojo en 1926.

Historio

Sed unue iom da historio pri la kreiĝo de Papiamento. La ĉefinsulo de Nederlandaj Antiloj, nome Kuracao, estis konkerita de Hispanujo relative frue, ĉirkaŭ 1499. La indianoj oficiale konvertiĝis al la katolikismo en 1527, sed post iom da tempo estis preskaŭ ekstermitaj kiel memstara gento: restis nur multaj mestizoj, ĉar la hispanoj konstante patrinigis ĉiujn atingeblajn indianinojn. Poste la insulo estis konkerita de Nederlando en 1634. En 1648 komenciĝis la alveno de sklavigitaj negroj el Afriko. Tiel ekformiĝis socio konsistanta el sklavigitaj negroj, mulatoj, mestizoj kaj ĉiuklasaj kvarteronoj. Ĝis hodiaŭ la loĝantaro de la arĥipelago, ekster la ĉefurbo, konsistas, preskaŭ ekskluzive, el negroj kaj mulatoj – mulatoj, ĉar eŭropanoj neniam rezignis patrinigi sklavinon.

La negocado per trafikado de negroj el Afriko, kiun ade praktikis preskaŭ ekskluzive portugalaĵoj, havis en Kuracao sian distribuocentron por Ameriko. Inter 1650 kaj 1750 oni importis al Kuracao po 20 000 negrojn ĉiujare. Pli poste tiu kvanto atingis 100 000 negrojn ĉiujare. En 1795 oni sufokis sklavoribelon; tiujare oni transigis la regadon de la insulo al Francujo. En 1800 la insulo venis sub la protektadon de Britujo; sed en 1802, pro la paco de Amieno, la insulo estis restituita al Nederlando; la restituado daŭris ĝis 1815.

La loĝantaro de tiuj tri insuloj, veninta el pluraj afrikaj etnoj kun malsamaj lingvoj kaj perforte devigita reciproke interkompreniĝi kaj, ĉefe, interkompreniĝi kun la portugalaĵoj kaj mastroj, forĝis al si lingvon de negra-portugala bazo. En la tri insuloj, tiu negra-portugala lingvo miksiĝis kun la hispana parolata en Antiloj kaj en la venezuelaj marbordoj. Aldone ĝi prenis multenombrajn vortojn el la nederlanda lingvo, kaj malgrandan sortimenton el la angla, ekz-e *cleps* el *to eclipse*, *muf* el *to move*, *chub* el *tube* ktp.

Kiel sekvaĵo de la triinsula historio, la nederlanda estas la oficiala lingvo de la registaro kaj ĝin oni instruas devige en ĉiuj lernejoj. Sed por ĝin komprenigi al la negroj kaj mulatoj kaj por la instruadomeĥaniko, oni

devas *ĉion traduki* en Papiamenton, kiu estas la universala lingvo de la tuta loĝantaro, escepte de la funkciuloj de la eŭropa administracio. Aldone Papiamento fariĝis la komunikilo de la katolikaj organizaĵoj. Tiu ĉi lasta fakto, ke la katolikoj normale uzas Papiamenton por siaj religiaj kaj sociaj rilatoj, klare montras, kiel tiu kreola lingvo, spontane formiĝinta dum la 17a kaj 18a jarcentoj inter tute analfabeta negra kaj multa plur-etnodevena popolo, iĝis la lingvo de la insulara kulturo. Hodiaŭ oni eldonas librojn kun folkloraj rakontoj, ĵurnalojn kaj revuojn, kaj oni uzas Papiamenton por radiodissendoj, televidaj programoj kaj beletra kreado.

Epitomo de la gramatiko

La fonetiko de Papiamento, en kies detalojn mi ne povas nun eniri, estas tre simpla sed kun kelkaj specifaĵoj, ekzemple nazaligo; tembroaliiĝo de senakcentaj vokaloj; tendenco redukti vortojn je du silaboj (ekz-e hisp. kaj port. *arriba* 'supre' > *riba*, hisp. kaj port. *muchacho* 'knabo' > *mucha*, hisp. *pájaro*, port. *pássaro* 'birdo' > *para*, hisp. *víspera*, port. *véspera* 'vespero' > *bispa*, k.s.); apokopigo de participoj finiĝantaj per *-ado*, *-ido*: *pasado* 'pasinta' > *pasá*, *cantado* 'kantita' > *cantá*; hisp. (*a*)*gradecido* 'danka' > *gradicé*, hisp. *comprendido* 'komprenita' > *comprendé*; kaj tiel plu.

La substantivoj estas absolute senŝanĝaj: ili varias nek por la gramatika klaso aŭ genro nek konas deklinacion. Pluralo formiĝas per la sufiksa aldono de la afrikdevena plurala triapersona pronomo *nan* 'ili': *muchanan grasioso* aŭ *mucha grasiosonan* 'ĉarmaj geknaboj', 'ĉarmaj knaboj', 'ĉarmaj knabinoj'; *prenda di oronan* 'orjuveloj', 'juveloj el oro'; sed kiam pluralo estas indikita per numeralo aŭ determinadjektivo, oni ne aldonas *nan*: *mi tin tres stul* 'mi havas tri seĝojn'. La seksohavajn estaĵojn oni indikas per aldono de *yú* 'filo'; tiel *yú hómber* 'filo' (etimologie 'filo viro'), *yú muhé* 'filino' (etimologie 'filo virino').

La difinartikolo estas *e* el la portugala demonstrativo *esse*: la nedifinita artikolo estas *un* singulare kaj *algún* plurale. *Un* 'unu'; *algún* (el la portugala kaj hispana *alguns/algunos*, *algumas/algunas*, ambaŭ apokopitaj) 'iuj', 'kelkaj'.

Ankaŭ la adjektivoj estas tute senŝanĝaj. La hispana kaj portugala

lingvoj posedas malsamfinajajn formojn por la gramatikaj vir- kaj in-genroj: *frto/frta* 'malvarma', *barato/barata* 'malmultekosta'. Sed la negroj konfuzas la du formojn kaj sekve ili fiksas unu el ambaŭ; tiel apud *nobo* (el la port. *novo* 'nova') aŭ *shegu* (el la port. *cego* 'blinda') kun ambaŭ valoroj de la originaj gramatikaj vir- kaj in-formoj, troviĝas *marga* (el la hisp. kaj port. *amargo/amarga* 'maldolĉa'), *bunita* (el la hisp. kaj port. *bonito/bonita*) 'bela', ktp.

La personaloj estas: 1-a pers. sing. *mi* 'mi', plur. *nos* 'ni'; 2-a pers. sing. *bo* 'ci', plur. *boso*, *bosonan* 'vi'; 3-a pers. sing. *ele*, *el*, *e* 'li, ŝi, ĝi' (sendistinge aplikeblaj); plur. *nan* 'ili'.

La verbo estas ankaŭ senŝanĝa. Infinitivoj, el vortoj latiniddevenaj, finiĝas per *-a*, *-e*, *-i*, kun apokopo de la originala fina *-r*: *mira* (el *mirar*) 'rigardi', *come* (el *comer*) 'manĝi', *drumi* (el *dormir* kun metatezo) 'dormi'; infinitivoj el nederlanda deveno ne havas apartajn finaĵojn: *wak* (el la nederlanda *waken*) 'vigli', *soru* (el la nederlanda *zorgen*) 'zorgi'. Kelkaj verboj ne devenas el infinitivaj etimoj, sed el aliaj verboformoj ofte uzataj, kiel *bai* 'iri' el *vai*, tria persono singulara de la portugala verbo *ir* 'iri'; el *vamos*, unua persono plurala de la sama verbo *ir*, Papiamento forĝis *bam*, uzata kiel infinitivo kaj kiel gramatikilo por indiki volitivon: *laganos bam baña* 'ni iru nin bani' (*laga* '(de)iri', *-nos* 'ni(n)' *bam* '-u', *baña* 'ban(iĝ)i').

La baza verboformo sen helpverbaj aldonoj rolas kiel infinitivo, preterita participo kaj volitivo. Kiam oni konjugacias personalan verboformon, ĝi postulas la antaŭaldonon de partikulo aŭ helpverbo. La helpverbaj partikuloj estas *a* (ĝenerale kun prefiksa valoro de perfekta prezenco) el la hispana *haber* 'havi', kaj *ta* el la hisp. kaj port. *está* 'estas' (kun prefiksa valoro de *-as*): *e ta mira* 'li rigardas', 'li estas rigardanta'; *mi ruman a bini* 'mia frato venis', 'mia frato estas veninta'. La daŭran aspekton, kiun Esperanto esprimas per *-ad-*, Papiamento esprimas en preterito per la antaŭmeto de *tábata* (el port. kaj hisp. *estava/estaba* + *está*): *e tábata malu* 'li est(ad)is malsana'. *Taba* sola ne estas uzata, sed jes aglutine kun *tin* el la hispana verbo *tener* 'havi': la formo pli uzata estas *tabatin*: *e tabatin hopi plaka* 'li hav(ad)is multe da mono'. Futuro esprimiĝas metante *lo* ĝenerale antaŭ, sed kelkfoje post, la pronoma subjekto: *lo mi cata* 'ni kantos', *lo bo mori* 'ci mortos'. *Lo* venas el la portugala *logo* 'tuj poste'.

Pasivo formiĝas per aldono de la verbo *ser* 'esti' kaj la prepozicio *pa* 'de':

Aktivo: *Mi tata ta cumpra un cas* 'Mia paĉjo aĉetas domon'. *Mi mama ta skirbi un carta* 'Mia panjo skribas leteron'.

Pasivo: *Un cas ta ser cumpra pa mi tata* 'domo estas aĉetata de mia paĉjo'. *Un carta ta ser skirbi pa mi mama* 'Letero estas skribata de mia panjo'.

Jen paradigmo de la Papiamenta verbo laŭ la tradicia nomenklatur:

Indikativo:

Prezenco (formiĝas per la antaŭmeto de *ta* = -as):

Singularo: *Nos ta canta, Boso ta canta, Nan ta canta* 'Ni kantas, Vi kantas, Ili kantas'.

Preterito (formiĝas per la antaŭmeto de *a* = perfekta prezenco):

Singularo: *Mi a canta, Bo a canta, El a canta* 'Mi kantis' ktp.

Pluralo: *Nos a canta, Boso a canta, Nan a canta* 'Ni kantis' ktp.

Imperfekta preterito (*tábata* = -adis):

Singularo: *Mi tábata canta, Bo tábata canta, E tábata canta* 'Mi kantadis' ktp.

Pluralo: *Nos tábata canta, Boso tábata canta, Nan tábata canta* 'Ni kantadis' ktp.

Futuro (formiĝas per la antaŭmeto de *lo* = -os):

Singularo: *Lo mi canta, Lo bo canta, Lo é canta* 'Mi kantos' ktp.

Pluralo: *Lo nos canta (Nos lo canta), Lo boso canta (Boso lo canta), Lo nan canta (Nan lo canta)* 'Ni kantos' ktp.

Kondicionalo:

Unua formo:

Singularo: *Lo mi canta, Lo bo a canta, Lo el a canta.*

Pluralo: *Lo nos a canta (Nos lo a canta) Lo boso a canta (Boso lo a canta) Lo nan a canta (Nan lo a canta).*

Dua formo:

Singularo: *Lo mi tábata canta, Lo bo tábata canta,* ktp.

Volitivo: Singularo kaj pluralo: *Cánta*

Infinitivo: *Canta.*

Gerundivo: *Cantando*.

Preterita participo: *Cantá*.

Intonacio iel rolas por emfazi volitivon kaj partikipon; mi tion markis per superstreko: *cánta*, *cantá*. Sed la intonacio ĉefe rolas, kiam oni volas akcente haĉi vorton.

Subjunktivo esprimiĝas per helpo de partikuloj kaj de helpverboj, sed la baza formo restas senŝanĝa.

En la leksiko la plej karakterizaj kaj popularaj sufiksoj estas *-mentu* (el la hisp. kaj port. *-mento*), *-or* 'aganto' kaj *-er* (kiu havas la variantojn *-eru*, *-e*) '-isto'. Tiel el la port. *acabamento* venas *kabamentu* 'finiĝo', el la port. *nascimento* venas *nasementu* 'naskiĝo'. Laŭ tiu formadosistemo kreiĝis *murimentu* (el la portugala kaj hispana *morrer/morir*) 'morto', *kimamentu* (el la port. *queimar*) 'bruligo/bruliĝo', *nengamentu* (el la port. kaj hisp. *negar* 'nei' plus la nazala infikso *-n-*) 'rifuzo'), *primintimentu* (el la port. kaj hisp. *permitir* kun metatezo, fermo de la *-e-* kaj nazaligo) 'permeso', ktp. La sufikso aplikiĝas ankaŭ al verboj nederlanddevenaj: *kapmentu di palu* 'arbohak(ad)o' el la nederlanda *kappen* 'haki'. La sufikso estas tiel viva, ke oni povas ĝin apliki al ĉiuj Papiamentaj verboj.*

Perspektivo

Nuntempe ekzistas procezo de leksika deskreoliĝo. Komence de la

* La sufikso *-mentu* venas el la latina *mentu(m)* (el *-men* + *-turn*) kies ĝenerala signifo indikas 'agon kaj rezulton'. Multaj latinaj vortoj formitaj per *menu(m)* eniris senŝanĝe la romanidajn lingvojn kaj el tiuj Esperanton: *alimento* el la latina *alere* 'nutri', *fundamento* el la latina *fondus* 'rurposedaĵo', *instrumento* el la latina *instruere* (*in* + *struere*) ktp. Tiu sufikso estas la plej viva kaj ĝenerala en Papiamento, kiel indikite. La vorto *papiamentu* mem formiĝis sur la portugala *papear* (prononcata *papjár*), *Papiamente papia*, eble el esprimisma onomatopeo, sub influo de la latina *papiare* 'pepi' (portugale *papear* signifas 'paroli, babili, interparoli') + *-mentu*. Strukture *papiamentu* estas formita ĝuste kiel *parlamento* el *parlar* (el la vulgarlatina *parabolari*) + *-mento*. Laŭ la Esperantaj ŝablonoj *arboida*, *rimoido*, *sufiksoido*, poveblus prove sendependigi la sufikson *-ment-* kun la pasvokalo *-o-*: *-oment-*. Tiel ni havus *frakasamento* 'ago kaj rezulto el *frakasi*', *heredomento* 'ago kaj rezulto el *heredi*', *hufomento* 'ago kaj rezulto el *hufi*', *meritomento*, *savomento*, *ŝarĝomento*, *ŝprucomento*, ktp.

nuna jarcento grandaj grupoj el venezuelanoj kaj kolombianoj sin translokis al la tri insuloj por establi komercajn rilatojn (ekde 1918 en Kuracao troviĝas ĉiufoje pli grandaj petrolrafinejoj kaj koneksaj industrioj) aŭ pro politikaj kaŭzoj. La komunikado de la insuloj kun la kontinento ekde tiam estas facila kaj konstanta. Tute malproksimiĝinta de la portugala lingvo post la sklavecabolicio, Papiamento ĉiufoje pli kaj pli sin helpas per la hispana lingvo ĉefe je ĉiuj leksikaj bezonoj, kiuj sin prezentas al ĝi. Se en la komenco de la nuna jarcento la leksiko devenis je 66% el la latinidaj lingvoj (hispana, portugala amerikanidaj), 28% el la ĝermanaj (nederlanda, angla) kaj 6% el aliaj fontoj, lastatempe la proporcio por la leksiko estas 85% el la hispana, 5% el la nederlanda kaj la cetera 10% el portugala aŭ afrika deveno kun iom da angla influo. Probable tiu procezo estonte plifortiĝos. Tamen Papiamento konservas ĝis nun tute senmanke sian funkciajn strukturon kaj sian valoron por la socia interkomunikado de la popolamasoj, kaj posedas kreskantan beletran kultivadon.

Aldona deziresprimo

La titola atribuo "la plej simplaj gramatikoj" rilatas al la hindeŭropaj, semidaj, ĥamidaj, finn-ougraj lingvofamilioj kaj al izolaj lingvoj kiel la vaska aŭ kelkaj kaŭkazaj. Post mia vizito en 1986 al Ĉinujo, kies lingvo estas vort-izola, kaj post kontaktoj kun japanoj kaj koreoj (bedaŭre mi ne havis okazon rilati kun spertaj tajaj esperantistoj), reprezentantoj de jarmilaj lingvotradicioj, mi multe ŝanĝis miajn vidpunktojn koncerne simplecon de lingvoj. Estus aparte interese, se kompetentaj ĉinaj, japanaj, koreaj, tajaj esperantistoj prezentus komparon inter siaj respektivaj lingvoj kaj Esperanto. Mi estas firme konvinkita, ke Esperanto, el lingvotipologia vidpunkto, ne apartenas al la hindeŭropa lingvofamilio, eĉ se leksike ĝi estas fundamente hindeŭropa. Sed nur leksiko ne konsistigas lingvon: lingvon konsistigas *sistemo* de signoj, kiujn popolo uzas por sin esprimi. Ekz-e la albana lingvo apenaŭ konservas 10% de sia origina leksiko, sed ĝi havas sian propran strukturon; la rumana lingvo posedas 60% da eksterlatina leksiko, sed ĝi daŭre restas latinida lingvo. Nu, se tiu kompara prilumado per la sudaziaj lingvoj okazos, eble ni povos pli vaste analizi Esperanton, ne nur kompare, sed

ĉefe surbaze de ĝia propra konstruo, kun rezigno de multo el la eŭrop-tradicia lingvonomenklatur – kiu ne malofte konfuzas kaj obskurigas niajn internacilingvajn esplorojn –, kaj tiel forĝadi nian propran gramatikan terminaron, nian memstaran lingvikan analizon, surbaze de nia aŭtoŝtona, indiĝena lingvosistemo.